

99a Kongreso de SAT:

“Paco kaj militoj. Datreveno de la Hispana Enlanda Milito”



La 99a SAT-Kongreso okazas en la urbo Leono inter la 19a de julio 2026 kaj la 26a de julio 2026. La kongreso koincidas kun la 90-jariĝo de la Hispana Enlanda Milito, kiu daŭre estas fonto de aktivaj debatoj en Hispanio, ĉefe rilate al la movado por rekuperado de historia memoro, kiu inter aliaj aferoj baraktas por identigi ekzekutitojn de la frankisma reĝimo, iam enterigitaj amastombe, por ke la familioj povu disponi digne de iliaj restaĵoj. La programo de la kongreso enhavas aktivecojn rilatajn al tiu memordato.



Organiza Kongres-Komitato



Pako Balibrea
Prezidanto



José Salguero "Kani"
Programo, ekskursoj



Carmen Cidoncha "Karmela"
Akceptejo, rezidejo



Ignacio Cancelo "Naçjo"
Kongresejo, ekskursoj

La membroj de la OKK multe dankas la laboron de Manolo Parra kiel kasisto de *SAT en Hispanio* (SATEH). Ni ege estimas lian helpon je la financoj de la kongreso kaj lian disponeblon kiam ajn ni bezonis ĝin.

Krome, ni ĉiam estos dankemaj al la Fondaĵo Sierra Pambley pro la cedado de ĝiaj spacoj dum la kongreso, ideala loko laŭ ni, kiu perfekte kongruas kun la valoroj de SAT. Laste, ni agnoskas la subtenon de la urbodomo de León pro la disponigo de la Palaco "Conde Luna".

Bonvenigaj vortoj

Saluton kaj bonvenon al Leono!

Ni esperas, ke via ĉeesto en la urbo kaj via partopreno en la SAT-kongreso estu fruktodonaj kaj agrablaj. La urbo abundas je interesaj vidindaĵoj kaj vi ne povos viziti ĉiujn laŭ la programaj proponoj, ĉar ne estos sufiĉe da tempo por tio. Sed ni invitas vin laŭ eble interkonatiĝi kun la urbo, vere riĉa je sociaj, historiaj kaj artaj aferoj.

Pri la kongreso, ni konfesas al vi, ke ne nur la OKK-anoj laboregis dum tuta jaro por havigi ege gravan planon kaj bonajn kongreskondiĉojn, sed ni ankaŭ ricevis tutan apogon de SAT, kaj membroj kaj postenuloj, kaj de SATeH, same de membroj kaj postenuloj kaj eĉ de sendependaj esperantistoj. Al ĉiuj ni dankas kaj pardonpetas pri la neeviteblaj misoj kiuj dum ĉiu kongreso aperas kaj nun aperos. Ni alvokas al bonvolemon de kongresanoj kaj ripetas niajn plej bonajn dezirojn.

Pri la temo "Paco kaj milito", ni deziris kongruigi la debatojn en la kongreso kun la nuntempa tutlanda cerbumado pri la historia okazaĵo de la hispana milito, kiu startis ĝuste antaŭ 90 jaroj. En la tuta Hispanio nun oni parolas pri ĉi. Kaj ankaŭ ni tion faros, dezirinde ekde plej progresemaj vidpunktoj.

La Organiza Kongres-Komitato de la 99a Kongreso de SAT
Pako, Kani, Karmela kaj Naĉjo



Leono: urbo, provinco kaj reĝlando

Leono ("León" en la hispana, "Llión" en la astur-leona lingvo) estas la ĉefurbo de la samnoma provinco, kiu apartenas al la aŭtonoma komunumo "Kastilio kaj Leono". Ĝi estas tre riĉa regiono el multaj vidpunktoj: tradicioj, vidindaĵoj, kuirarto, pejzaĝoj kaj natura diverseco.

La urbo fondiĝis en la jaro 29 a.K. kiel milita tendaro de la romia legio *VI Victrix* kaj poste iĝis konstanta bazo por kontroli la orminojn de la regiono. Dum la kristana rekonkero kontraŭ la islama regado de la Iberia Duoninsulo, en la jaro 910, la ĉefurbo de la Reĝlando Asturio translokiĝis al Leono, kaj fariĝis unu grava kristana lando.



Hodiaŭ videblas la potenco de la tiama mezepoka reĝlando, kiun atestas ĝia franc-stila katedralo kaj nombraj romanikaj preĝejoj. Tamen, la leona regiono estas vasta areo, kies loĝantaro maljuniĝas kaj malkreskas, kio kaŭzas gravajn sociajn kaj ekonomiajn problemojn. Krom la ĉefurbo, Ponferado estas la plej loĝata urbo, kaj tra ĝi same pasas la fama Jakoba Vojo. Astorga estas alia historia loko kun propra katedralo.

Fondaĵo Sierra Pambley

La Fondaĵo Sierra Pambley estas privata, neprofitcela organizaĵo dediĉita al edukaj kaj kulturaj agadoj en la provinco Leono, Hispanio, ekde 1887. Ĝin fondis *Francisco Fernández-Blanco* y *Sierra Pambley* (konata kiel Sinjoro Pako), kiu dotis ĝin per la plimulto de sia persona riĉaĵo.

La laboron de la Fondaĵo ĉiam gvidis kraŭsisma filozofio kaj novigaj edukaj aliroj. Ĝia celo estis provizi aliron al edukado por la infanoj de la laborista klaso per la kreado de lernejoj kaj labor-atelieroj kaj en la urbo Leono kaj en kamparaj regionoj.

Ekde januaro 2007, la Fondaĵo Sierra-Pambley ankaŭ funkciigas hispanlingvan programon por enmigrintoj, kies ĉefa celo estas helpi unu el la plej malfavorataj grupoj en la hodiaŭa socio. Per ĉi tiu programo, la Fondaĵo celas ne nur provizi ilin per adekvataj komunikadaj kapabloj, sed ankaŭ per la necesaj iloj por iĝi plenaj civitanoj.




Kongresejoj

Oni avertas, ke pro loĝistikaj kialoj, du diversaj ejoj disponeblas por la disvolviĝo de la kongreso. De **lundo ĝis ĵaŭdo**, la kongreso okazos en la salonoj de la Fondaĵo Sierra Pambley, kiu okupas grandan blokon ĝuste antaŭ la katedralo. Ĉar la konstruaĵo havas tri malsamajn enirejojn, bonvolu vidi sur la sekva bildo, ke la kongresejo atingeblas tra la strato nomata "Dámaso Merino". De la rezidejo, oni atingas ĝin post nur 3 minutoj piedirante.



Sabate la kongresejo ŝanĝiĝos al la Palacio "Conde Luna", kiu troviĝas same en la historia urbocentro, proksime de la rezidejo (je nur 5-minuta distanco). Memoru, ke **vendrede** ni ekskursos la tutan tagon.

La Palacio "Conde Luna" situas sur loko kiu estis la politika centro de la urbo dum la Alta Mezepoko. La konstruaĵo estas esence organizita en tri partojn: la gotika sekcio, la renesanca turo, kaj la centra komplekso ĉirkaŭita de ambaŭ.



Prelegoj

Regiono, tradicioj kaj interesaĵoj de Leono

Lundon je la 9:45, de Pako Balibrea kaj Naĉjo Kancelo

La du nuraj leonaj membroj de la OKK, kiuj parolos pri la urbo Leono, nome unu el la plej tradiciaj, historiaj provincaj ĉefurboj en Hispanio. Leono estis jam grava urbo en romia epoko (ligita al grava komunikilo Arĝenta Vojo), kaj same en mezepoko, kiel ĉefurbo de unu el la plej gravaj regnoj en la kristana parto de la tiama lando.

Romanoj kaj filmoj pri la Hispana Enlanda Milito

Lundon je la 16:30, de de José Salguero “Kani”

La hispana milito estas unu el la unuaj militoj de la 20-a jarcento, kiu okazigis grandan produktadon (ĉefe propagandcele) de literaturaj kaj alitipaj verkoj (filmoj, kantoj, teatraĵoj, pentrarto ktp.). La historio de tiu enorma produktado vastiĝis eĉ eksterlande jam ekde la unuaj monatoj de la milito. Kvankam tiu produktado funkciis libere ekster Hispanio, dum la frankisma epoko ĝi vidiĝis kondiĉita de la diktatura cenzuro interne. Ĉirkaŭ la 1980-aj jaroj profite de la reveno al demokratio estiĝis alia epoko kaj eĉ nun tiu afero plue rezultas en aktiva verkokampo.

Arbaraj incendioj: spertoj kaj solvoj

Mardon je la 16:30, de Pako Balibrea kaj Alla Kudrjaŝova

Pasintjare okazis enormaj arbarincendioj en aparta areo de la provinco Leono kaj tro ofte en tuta Nordokcidenta Hispanio kaj najbara Portugalio, kie fakte abundas arbaroj, kiuj suferas tiun plagon. Aliflanke tradicia rearbarigo kaj helpata natura regenerado lukta kontraŭ tio. La prelego atestas la sperton de la itala volontuma organizo DRIADE, kies ambiciaj planoj estas reala ebleco por esperantistoj montri la valoron de la Internacia Lingvo.



Kulturo en Senegalo

Mardon je la 17:30, de Assane Faye kaj Charles Diatta

Senegala kulturo estas riĉa kaj diversa, formita de la multaj etnaj grupoj de la lando, inkluzivante Volofojn, Fulaojn (Peulojn), Sererojn, Diolojn kaj Mandinkojn, ĉiu kontribuante siajn proprajn tradiciojn, lingvojn, muzikon, dancon kaj praktikojn. Ĝi estas ŝlosila motoro de ekonomia disvolviĝo, ofertante ŝancojn per turismo, metiarto kaj tradiciaj praktikoj. Konservado ĉi tiun kulturecan diversecon estas decida por nacia identeco kaj ekonomia kresko.

Rifuĝintoj en Grekio


Mardon je la 18:00, de Annie Grente

Persona sperto de esperantistino kiu delonge aktivas en grekaj insuloj cele al helpo al rifuĝintoj kiuj venas al Eŭropo kaj aparte por disvastigi pri la teruraj cirkonstancoj kiujn ili trafas je sia alveno ĉi tien, ĉefe en Grekio, kien ili venas el Turkio, sed ne nur. Oni devas scii pri la mortoj de tiom da enmigrintoj pro la trapaso de la maro, la disigo de familioj, la malfacilaĵoj kiujn ili suferas en koncentrejoj en Grekio kaj en aliaj landoj. Al tio aldoniĝas la lingva problemo, juraj baroj, kaj eĉ politika kontraŭstaro fare de reakciaj dekstraj kaj naciismaj sektoroj.

Maruja Mallo, forgesita pentristino

Mardon je la 18:30, de Ana Manero

Maruja Mallo estis eksterordinara virino, kiu aktive partoprenis la hispanan kulturan vivon komence de la 20a jarcento. Ŝi gravas ĉefe kiel pentristino, sed ne nur. Ankaŭ kiel feministino, socia aktivulino kaj intelektulino. Per la forto de ŝia personeco, ŝi radikale influis la verkaron de du el la plej gravaj poetoj siatempaj.



Esperanto en la milito

Merkredon je la 17:30, de Toño del Barrio

Esperanto estas ofte konsiderata la lingvo de la paco. Sed en iuj historiaj momentoj ĝi estis ankaŭ utiligata en militaj kuntekstoj. La plej konata okazo estis la hispana intercivitana milito, kie Esperanto estis ofte uzata por propagandi la apogon al la respublikanaj fortoj kaj en aliaj cirkunstancoj. Ni esploros la uzon de Esperanto en tiu konfrontiĝo kaj la lecionojn eltireblajn el ĝi.

Mamdani, alia politiko eblas

Merkredon je la 18:30, de pastro Eubilio (hispane-esperante)

Novjorko, unu el la plej riĉaj kaj plej diversaj urboj de la mondo, estas ankaŭ unu el la plej malegalecaj kaj malamikecaj por siaj loĝantoj. En ĉi tiu situacio, la nova urbestro Mamdani sukcesis revivigi la politikan esperon de granda parto de la civitanoj. Lia strategio estis: kono de la konkreta realo, financa planado bazita sur justaj progresemaĵoj impostoj, kaj sperto de vera demokrata partopreno dum la propra balotkampanjo.



Prestiĝo de Esperanto

Ĵaŭdon je la 16:30, de Aleksander Zdechlik

Ĉi tiu prelego temas pri la rolo kiun havis maldekstraj politikaj fortoj por kresko de la prestiĝo de Esperanto post unua mondmilito.

Eksterlandanoj en la milito

Ĵaŭdon je la 17:30, de Xavier Alcalde

Kiuj estis la internaciaj esperantistoj, kiuj venis al la hispana milito? Kiom da ili estis? El kiuj landoj ili venis? Kian ideologion ili havis? Kiomgrade Esperanto gravis en ilia sperto? Ni provos respondi tiujn demandojn pere de serio da vivovojoj, kiuj entute evidentigas la diversecon, sed ankaŭ la vigecon de tiu komunumo de transnaciaj idealistoj, montrante samtempe iujn komunajn tendencojn.

Rabitaj beboj dum kaj post la diktaturo

Ĵaŭdon je la 18:30, de Lola Pérez (hispane-esperante)

Malapero estas klara malobservo de homaj rajtoj. Ekzemple, niaj kazoj servos por montri la doloron kaj torturon suferitajn de la viktimoj. Ĉi tiu prelego traktos la originojn de malaperoj; la elfositajn restaĵojn de kelkaj familianoj; kaj la enketon pri la entombigo de beboj en la tombejo de Alikanto.



Libroj kaj filmoj

Prezento de libro: “La Valizeto”

Lundon je la 12:10, de Marcel Redulez

Post longa silento, SAT-EFK ĵus eldonis novan libron. Temas pri la unua romano verkita de Marcelo Redulez. Bazitaj sur historiaj eventoj (la savagado de Aristides de Sousa Mendes en 1940 kaj la Ĝuangĝua Movado por Demokratio en 1980) prezentitaj dum prelegoj okaze de SAT-kongreso en Oporto, fikciaj rolantoj renkontas realajn SAT-anojn. Ja Esperanto gravas kiel ŝlosilo por la heroinoj revivigi siajn familiajn radikojn.

Prezento de libro: “Rekviemo por hispana kamparano”

Lundon je la 17:30, de José Salguero “Kani”

Prezento de traduko al Esperanto de la fama romano ”Réquiem por un campesino español” de Ramón J. Sender, farita de esperantisto Antonio Valén. Ĝi rakontas la vivon kaj morton de kamparano Pako, reflektante la tragedion kaj streĉojn je la komenco de la Hispana Enlanda Milito.


Filmo: “La instruisto kiu promesis la maron”

Lundon je la 17:45.

La subpremado fare de la venkintoj en la milito falis ĉefe sur diversaj sektoroj de la supozita malamikaro, nome kompreneble maldekstruloj, sed ankaŭ alitipaj politikistoj, sindikatistoj, intelektuloj, funkciuloj ktp., kaj, ĉu surprize? ankaŭ sur miloj da instruistoj kiuj estis elpostenigitaj, arestitaj kaj grandparte brutale ekzekutitaj. Estas pluraj literaturaj verkoj kaj filmoj kiuj respegulis tiun aferon.

Tiu ĉi filmo (nun prezentita kun esperantlingvaj subtekstoj) rakontas la realan historion de juna instruisto, kiu estis ekzekutita ĉar li estis al-

portinta al la vilaĝo modernajn instrumentojn, laŭleĝan laikismon kaj alproksimigon al la lokanoj. Krome la rakonto estas interplektita kun la klopodoj de juna kataluna esploristino kiu venas en la aktuala traserĉi la memoron de la ekzekutita instruisto, kiu promesis al siaj gelernantoj ekskurson al la maro, kiu ne eblis. La Rekupero de la Historia Memoro estas aktiva socia movado en la nuntempa Hispanio.



Dokument-filmo: “Alcindo”

Vendredon je la 21:00. Rezidejo.

La 10-an de junio 1995, por memorfesti la Tagon de la Kuro kaj la venkon de Sporting en la Portugala Futbala Pokalo, grupo de portugalaj etno-naciistoj eliris sur la stratojn de Bairro Alto (Lisbono) por bati nigrulojn. La oficiala kalkulo estis 11 viktimoj, unu el kiuj mortis (Alcindo Monteiro).

Kulturaj vesperoj

Dimanĉon:

Interkonatiĝa vespero.

Koincidante kun la finalo de la futbala monda pokalo.

Lundon:

Bierumado en tradicia trinkejo “La Korvo” (“Taberna el Cuervo”).

Ankaŭ por interkonatiĝi, gustumante bieron, vinon aŭ aliajn trinkaĵojn.

Mardon:

Koncerto de la Dancontaj Musoj (je la korto de la rezidejo).

Artist-paro konformita de Vinjo kaj Krikru. Iliaj danceblaj, amuzaj, poeziaj kaj socie konsciaj verkoj en Esperanto estas prezentitaj ludema maniero kiu tuj establas konekton kun la publiko. Ili estas prezentitaj kun du voĉoj, gitaro, harpo ... kaj kelkfoje, gastaj muzikistoj.

Merkredon:

Komuna kantado (rezistokantoj) organizata de Ana Ribeiro.

Ĵaŭdon:

Tradicia muziko kaj dancado sur la strato (placo San Pelayo, antaŭ la rezidejo), gvidata de folkloro leona grupo *Barandal’*.

Vendredon:

Dokument-filmo: “Alcindo” (2021) (portugale-esperante) en la rezidejo.

Sabaton:

Adiaŭa vespero.

Ekskursoj

Pago de la ekskursoj:

Oni pagos la du ekskursojn kontante al la membroj de la OKK, aŭ en la akceptejo (en la rezidejo, dimanĉe) aŭ en la kongresejo (lunde).

Duontaga ekskurso (merkredon la 22an - 10 eŭroj)

Foriro de la rezidejo je la 9:40.

Urba ĉiĉeronado gvidata de volontuloj. Jen la ĉefaj vidindaĵoj:

- Ĉirkaŭaĵo de la katedralo kaj la romiaj muregoj.
- Muzeo de Sankta Isidoro (la panteono de la leonaj reĝoj).
- Muzeo de Leono.
- La strato Calle Ancha (la "Larĝa Strato" de la malnova urbo).
- Fasado de la Casa Botines (verko de Antoni Gaudí).
- Fondaĵo Sierra Pambley (Salono Cossío).

Averto:

Bonvolu rimarki, ke la itinero **ne inkluzivas** la viziton al la Muzeo de la Fondaĵo Sierra Pambley pro komplikaj loĝistikaj kialoj. Tamen, la OKK varme rekomendas tiun viziton ekster la oficiala ekskurso dum la sekvaj horaroj. Se vi ne parolas la hispanan, bonvolu kontakti aliajn kongresanojn, kiuj eventuale povus traduki la gvidadon por vi.

De merkredo ĝis dimanĉo:

Je la 11:00, 13:00, 17:00 kaj 19:00. Kosto: 5 eŭroj (ĵaŭdon senpage).

Tuttaga kaj natura ekskurso (vendredon la 24an, 5 eŭroj)

La rezidejo havigos piknikon por ĝiaj loĝantoj. Itinero:

- 8:50 - Foriro de la rezidejo.
- 9:16 - Preni buson en stacidomo de Padre Isla (nomata "León").
- 9:34 – Preni FEVE trajnon en la trajhaltejo "Asunción-Universidad" ĝis la vilaĝeto Valdepiélagu.
- 10:30 – Komenco de la ekskurso. Promenado tra la flanko de la rivero Kuruenjo (Curueño).
- 12:30 – Alveno al la vilaĝeto Montuerto.
- 13:00 – Pikniko kaj diversaj aktivajoj.
- 14:30 – Reveno al la trajnhaltejo.
- 16:30 – Preni FEVE trajnon ĝis León.
- 18:00 – Alveno al la rezidejo.

Grave: kunportu vian **banveston** por baniĝi en la rivero kaj **ĉapelon** por protekti vin kontraŭ la suno!



Oficiala programo - SAT Kongreso 2026

	Diman. 19a	Lundo 20a	Mardo 21a	Merkredo 22a
8:00 9:30		Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo
9:30 13:00		9:30 Inaŭguro de la libroservo 9:45 Prelego: <i>“Regiono, tradicioj kaj interesaĵoj de León”</i> 11:00 Malfermo de la kongreso 12:10 Libro: <i>“La Valizeto”</i> 12:30 Komuna foto	9:30 Libroservo 10:00 <u>1a Laborkunsido:</u> Jar-raportoj 12:00 LEA-komitato	Duontaga ekskurso: Itinero tra la urbo (9:30 , 10 eŭroj). Vizitoj: Sankta Isidoro, Fondaĵo Sierra-Pambley, Muzeo de Leono, ...
13:00 15:00		Tagmanĝo	Tagmanĝo	Tagmanĝo
15:00 16:30		Ripozo	Ripozo	Ripozo
16:30 19:30	Akcepto de la kongresanoj	16:30 Prelego: <i>“Romanoj kaj filmoj pri la Hispana Enlanda Milito”</i> 17:30 Libro: <i>“Rekviemo por hispana kamparano”</i> 17:45 Filmo: <i>“La instruisto kiu promesis la maron”</i>	16:30 Prelego: <i>“Arbaraj incendioj: spertoj kaj solvoj”</i> 17:30 - Prelego: <i>“Kulturo en Senegalio”</i> 18:00 - Prelego: <i>“Rifuĝintoj en Grekio”</i> 18:30 - Prelego: <i>“Maruja Mallo, forgesita pentristino”</i>	16:30 <u>2a Laborkunsido:</u> Laborgrupoj 17:30 Prelego: <i>“Esperanto en la milito”</i> 18:30 Prelego: <i>“Mamdani, alia politiko eblas”</i>
19:30 21:00	Vespermanĝo	Vespermanĝo	Vespermanĝo	Vespermanĝo
21:00 22:30	Interkonatiĝa vespero	Bierumado en trinkejo “La Korvo”	Koncerto de la “Dancontaj Muŝoj”	Komuna kantado

Oficiala programo - SAT Kongreso 2026

	Ĵaŭdo 23a	Vendredo 24a	Sabato 25a	Diman. 26a
8:00 9:30	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo
9:30 13:00	9:30 Libroservo 10:00 <u>3a Laborkunsido:</u> Venont-jara kongreso kaj Plenum-Komitato 11:30 Komunista frakcio 11:30 Liberecana frakcio (kaj prelego ”150 jaroj de la morto de Bakunin”) 12:15 - Aliaj frakcioj	Tuttaga kaj natura ek-skurso (5 eŭroj) 8:50 Foriro de la rezidejo 9:16 Preni buson en la stacidomo FEVE ”León” 9:34 Preni FEVE trajnon ĝis la vilaĝeto Valdepiélago 10:30 Komenco de la ekskurso 12:30 Alveno al la vilaĝeto Montuerto	10:00 <u>4a Laborkunsido:</u> Gvidrezolucio kaj Deklaracio (en alia sidejo: “Palaco de Conde Luna”)	Foriro de la kongresanoj
13:00 15:00	Tagmanĝo	Pikniko	Tagmanĝo	
15:00 16:30	Ripozo	Reveno	Ripozo	
16:30 19:30	16:30 Prelego: “ <i>Prestiĝo de Esperanto</i> ” 17:30 Prelego: “ <i>Eksterlandanoj en la milito</i> ” 18:30 Prelego: “ <i>Rabitaj beboj dum kaj post la diktaturo</i> ”	16:30 Preni FEVE trajnon ĝis León 18:00 Alveno al la rezidejo	17:00 <u>4a Laborkunsido:</u> Gvidrezolucio kaj Deklaracio (en alia sidejo: “Palaco de Conde Luna”) 19:00 Fermo de la kongreso	
19:30 21:00	Vespermanĝo	Vespermanĝo	Vespermanĝo	
21:00 22:30	Tradicia muziko sur la strato	Dokumentfilmo: “ <i>Alcindo</i> ” (2021)	Adiaŭa vespero	

Rekomendoj de la OKK

Lokoj por kafumi (aŭ havi ĉokoladon, glaciaĵon, ...)

- *Chocolatería Valor* (Calle Ancha, 8): loko por gustumi aŭ kafon aŭ ĉokoladon, tre proksime de la kongresejo.
- *Restaurante El Patio* (Plaza Torres de Omaña): restoracio kun agrabla korto kie kafumi trankvile.
- *Holy Cow* (Plaza Torres de Omaña): itala glaciaĵ-vendejo (kun itala mastrumanto), delonge la plej estimata en León. Oni trovas multajn elektojn de glaciaĵoj faritaj de fruktoj (veganaj).

Restoracioj kun vegetaraj / veganaj opcioj

- *El Colibrín* (Plaza Santo Martino): trinkejo kun vigla atmosfero, nur malfermita dum vesperoj, kun kelkaj veganaj pladoj (tapas).
- *Restaurante La Unión* (C. Flórez de Lemos, 3): la unua vegetara kaj vegana restoracio en León, kiu troviĝas 20 minutojn for de la urbocentro. Malfermita nur tagmeze.
- *La Factoría Vegana* (C. Fernando III el Santo, 5): vegana restoracio situata 15 minutojn for de la rezidejo. Nepras rezervi antaŭe.

Kulturaj vizitoj

- **Nur dum mardo vespere** (el la 17a horo ĝis la 19:30), la vizito al la *katedralo* estas **senpaga**. Male la vizito kostas 8 eŭrojn. La vizito de ĝia klostro estas ĉiam senpaga.
- *Museo Casa Botines*: konstruaĵo en modernisma stilo, desegnita kaj konstruita de la arkitekto Antoni Gaudí. La eniro kostas 10 eŭrojn, aŭ 13 por gvidata rondiro. Oni rekomendas rezervi rete.
- Festivalo *León, Cuna del Parlamentarismo*. Vidu programon rete.

Listo de partoprenantoj

1. Pako Balibrea (Leono, Hispanio), 36239.
2. Suzanne Bolduc (Montrealo, Kebekio-Kanado), 36148.
3. José Salguero “Kani” (Don Benito, Hispanio), 35501.
4. Carmen Cidoncha (Don Benito, Hispanio), 35584.
5. Juan Luis Salguero (Badajoz, Hispanio).
6. Ana Manero (Madrigo, Hispanio), 36189.
7. Manolo Parra (Madrigo, Hispanio), 35825.
8. Ana Ribeiro (Porto, Portugalio), 36177.
9. José Pedro Baranita (Porto, Portugalio), 36178.
10. Ricardo Biurrun (Madrigo, Hispanio), 35858.
11. Vinko Markovo (Morlezo, Francio), 35297.
12. Claudine Gueguen (Morlezo, Francio).
13. Dominik Schramm (Donostia, Eŭskio-Hispanio), 35707.
14. Annie Grente (Samos, Grekio), 36101.
15. Bruno Henry (Fameck, Francio), 34987.
16. Manjuan Zhang (Changsha, Ĉinio).
17. Christopher Wood-Archer (Gateshead, Britio), 36137.
18. Ne deziras aperi en la kongreslibro.
19. Aleksander Zdechlik (Zabrze, Pollando).
20. Jarosław Gerszyński (Gliwice, Pollando).

21. Franciska Toubale (Mount Evelyn Victoria, Aŭstralio), 34507.
22. Lucette Échappé (Saint-Sébastien-sur-Loire, Francio), 35850.
23. Félix Manuel Jiménez Lobo (Madrid, Hispanio), 35944.
24. Matilde Montero (Madrid, Hispanio).
25. Igor Mendes (Queluz, Portugalio).
26. Inês Viera Lobão (Queluz, Portugalio).
27. Roger Prieto (Porto, Portugalio), 36135.
28. Alexandra Paz (Porto, Portugalio), 36134.
29. Ignacio Cancelo (Leono, Hispanio).
30. Guy Martin (La Rochelle, Francio), 35861.
31. Vito Markovo (Anĝevo, Francio), 35521.
32. Toño del Barrio (Alkorkono, Hispanio), 35522.
33. Ana Sánchez Fernández (Alikanto, Hispanio).
34. Grigorij Gehxt (Merzhausen, Germanio), 34710.
35. Ne deziras aperi en la kongreslibro.
36. Yann Aubain (Liono, Francio), 36259.
37. Isabelle Gautier (Liono, Francio).
38. Christophe Collay (Marsejlo, Francio), 36262.
39. Solange Van Landeghem (Bourges, Francio), 36007.
40. Françoise Guihaume (Francio), 35683.
41. Frank Mintz (Francio), 36114.

42. Frédéric Neyret (Milano, Italio).
43. Alessandra Orlando (Milano, Italio).
44. Renaud Balleyguier (Clermont-Ferrand, Francio), 36247.
45. Lola Pérez (Guardamar, Hispanio), 36121.
46. Tiberio Madonna (Caserta, Italio).
47. Ne deziras aperi en la kongreslibro.
48. Pedro Hernández (Madrido, Hispanio).
49. Paul-Henri Lesprit, 36215.
50. Mateu Vic (Asturio, Hispanio).
51. Denise Happi-Fosso (Parizo, Francio), 35740.
52. Pako Belmonte (Barcelono, Katalunio-Hispanio), 36152.
53. Xavi Alcalde (Barcelono, Katalunio-Hispanio).
54. Saioa Escobar (Barcelono, Katalunio-Hispanio), 36011.
55. Paŭlino Gaborit (Anĝevo, Francio), 36175.
56. Marcelo Redulez (Cambes, Francio), 32846.
57. Xabier Rico Iturriotz (Vitoria-Gazteiz, Eŭskio-Hispanio).
58. Gloria Gargallo (Lastresne, Francio).
59. Sol Roca (Taragono, Katalunio-Hispanio).
60. Francesc Inglada (Taragono, Katalunio-Hispanio).
61. María Elvira Álvarez-Iglesias (Vigo, Hispanio).
62. María Luisa Santamarta (Leono, Hispanio).

- 63. Jean-Charles Paoletti (Langenmosen, Germanio), 36271.
- 64. Alexandre Amorim (Brazilo).
- 65. Tabatha Fabri (Bruselo, Belgio).
- 66. Paulo Meliz (Aragono, Hispanio), 36154.
- 67. Angel Garcia Gutierrez (Santander, Hispanio).
- 68. Irina Grigorieva (Santander, Hispanio).
- 69. Guillem Gómez Blanch (Valencio, Hispanio), 36028.
- 70. Izumi Yorimiti “Jo” (Ueda, Japanio), 36248.
- 71. Miguel Ángel Juárez (Alikanto, Hispanio).
- 72. Xon Vilahur (Ĝirono, Katalunio, Hispanio).
- 73. Virginie Harlet (Francio), 36261.

Rezistokantoj (paco kaj milito)

La dizertonto – Le déserteur

Teksto kaj muziko de Boris Vian - Traduko de Georgo Lagranj'.

Sinjoro Prezident'
Mi skribas ĉi-leteron,
kaj havas mi esperon,
vi legos kun atent'.

Alvenis jen paper'
kun la ordon-invito,
foriri al milito,
merkrede je l' vesper'.

Mi diras sen rezon'
ke tion mi ne faros,
mi sur la ter' ne staros
por murdo de la hom'.

Ne ofendiĝu vi,
se mi per ĝi vin spitas,
mi ĉion mem decidas
kaj tuj dizertos mi.

En mia juna aĝ'
formortis mia patro,
foriris mia frato
kaj brulis la vilaĝ'.

Patrino pro sufer'
jam kuŝas en la tombo,
ne zorgas ŝi pri bombo,
ne zorgas eĉ pri verm'.

Dum mia kaptitec'
jam oni la edzinon
forŝtelis kaj animon
kaj la pasinton eĉ,

Jam morgaŭ sen prokrast'
fermiĝos mia pordo
al jaroj de la morto
kaj fuĝos mi kun hast'.

En almoz-peta viv'
mi iros tra la mondo
mi estos vagabondo
kaj diros re al vi:

“Rifuzu al buĉad',
rifuzu murd-inciton
ne faru vi militon,
rifuzu al murdad' ”

Se fluu nun la sang'
la propran do vi donos,
jen kion mi proponos,
Sinjor' de alta rang',

Kaj se vi serĉos min,
eksciuj trup' ĝendarma,
ke estos mi senarma:
Ĝi pafu do sen tim'.

Libera la pens' – Die Gedanken sind frei

Anonima germana originalo (antaŭ 1800); Traduko: B. Klail

La penso de la hom'
Libera ja estas
Samkiel fantom'
Kaŝita ĝi restas
Ĝin hom' ne divenos,
Nek ĉirkaŭkatenos,
Do restas laŭ senc',
Ke libera la pens'!
Mi pensas laŭ plezur'
Nenie ĝin citas,
Sekrete mi nur
Pri ĉio meditas.
Dezirojn – vi sciŭ –
Malhelpas neniŭ,
Do restu laŭ senc',
Ke libera la pens'!

Se iam kaptos min
Karcero malhela,
Deklaros mi ĝin
Agado sencela:
La pensoj trapasos,
La murojn frakasos
Per granda potenc'
Ĉar libera la pens'!
Do tial nun ĉe fin'
Mi zorgojn forpelas;
Turmentas ili min,
Vivĝojn forŝtelas.
Mi povas sentime
Ĝojadi anime
Kaj pensi de komenc':
Ja libera la pens' ! - ×2

En la Fronto de Gandesa

Teksto: Tradicia el hispana milito

Traduko: Kaj Tiel Plu

Se vi volas skribi min
ne hezitu pri l'adreso
en la fronto de Gandesa
avantgarda paŝlineo

Se vi volas manĝi pli
por la fuĝ' havi energion
en la fronto de Gandesa
havas vi restoracion

Ĉe la pordo de l'manĝejo
estas maŭro Mohamed'
- Kion vi deziras manĝi?
Li demandas kun ridet'

L'unuan pladon portos tuj
li kun kugloj kaj grenadoj
kaj la duan kun mitralo
ne forgesu la menuon

Al la barikadoj – A las barricadas

Teksto: Valeriano Orobón Fernández; Muziko poldevena; traduko: JoMo
Himno de la CNT dum la hispana enlanda milito

Nigraj ŝtormegoj skuegas aerojn
 Kaj grandegaj nuboj nin malhelpas vidi plu
 Eĉ se nin atendas doloro kaj morto
 Kontraŭ malamika dev' antaŭenpuŝas ni
 Nenio pli preza por la Liberec'
 Devas ni ĝin savi kun fid' kaj kuraĝ'
 Altigu la flagon revolucieman
 Sub kiu popolo marŝas al elservutiĝ'

Al la barikadoj, al la barikadoj,
 Por la triumfo de la konfederaci'.

Ja vi venkos - Venceremos

Ĉila subteno al Allende en 1970; Teksto: S.Ortega; Muziko: K. Itura
Traduko: R. Corsetti kaj Mauro La Torre

Refreno (×2):

Ja ni venkos, ja ni venkos,
 ĉenoj mil jam ekpretas por
 romp';
 ja ni venkos, ja ni venkos,
 malriĉecon pelos ni for.

De la grundo patruja profunda
 nun leviĝas popola la kri';
 anonciĝas la nova erao
 kaj ekkantas la tuta Ĉili':
 Memorante la bravan soldaton
 kiu glore batalis ĝis mort'
 ni unuaj la morton alfrontos,
 al patrujo nenia perfort'.

Refreno

Kamparano, soldato, virino,
 de l' patrujo student', laborist',
 agu ĉiu por nia nacio,
 ankaŭ vi oficist' kaj minist'.
 Kaj la gloron ni semos en tero
 komunisma ja estos la mond'
 Kune ni historion estigos
 de la estont', de la estont',
 de la estont'.

Refreno

Ĝis revido gerilestro Ĉe-Gevara

Teksto kaj muziko : Carlos Puebla; Traduko de Ĝanfranko Molle

Ni vin amlernis kun forto
Sur historie alta pinto
Kie la brav' de via pasinto
Limigis povon de morto

Refreno:

Por ni nun restas la klara
La tre profunda traglimo
De via kara proksimo
Gerilestro Ĉe-Gevara

Vi brave per glora mano
Transpafas histori-baron
Kaj leviĝas santaklaron
La em' pri vi, gerilano

Refreno

Vi venas de vent' por brido
Dum suna printempa tago
Por enplanto de la flago
Per la lum' de via rido

Refreno

La amo revolucia
Kondukas nun vin kun firmo
Kie necesas vera ŝirmo
De forta la brako via

Refreno

Pluluktos ni kun decido
Eĉ se vi ne plu kuniras
Kun Fidel' ni vin diras'
"Gerilestro, ĝis revido!"

Refreno

Ho belulin' ĝis – Bella ciao!*Anonima itala — Traduko de Renato Corseti*

Iun matenon vekiĝis mi
 Ho! Belulin', belulin', belulin',
 ĝis, ĝis
 Iun matenon vekiĝis mi
 Kaj tie estis malamik'

Ho! Partizano forportu min
 Ho! Belulin', belulin', belulin',
 ĝis, ĝis
 Ho! Partizano forportu min
 Ĉar mi estas ĉe la mort'

Kaj sen mi mortos kiel partizano
 Ho! Belulin', belulin', belulin',
 ĝis, ĝis
 Kaj se mi mortos kiel partizano
 Vi devos entombigi min

Mia tombo estu sur la montaro
 Ho! Belulin', belulin', belulin',
 ĝis, ĝis
 Mia tombo estu sur la montaro
 Ĉe la ombro de floreg'

Kaj la popolo tien ironta
 Ho! Belulin', belulin', belulin',
 ĝis, ĝis
 Kaj la popolo tien ironta
 Certe diros: "Bela flor'!"

Jen estas floro de partizano
 Ho! Belulin', belulin', belulin',
 ĝis, ĝis
 Jen estas floro de partizano
 Mortis li por liberec'

Aj, Karmela!

Teksto: Tradicia el hispana milito; Traduko kaj aranĝoj: Kaj Tiel Plu

La armeo de la Ebro	sed nenion povas bomboj
rumba la rumba la rumba la (×2)	rumba la rumba la rumba la (×2)
nokte riveron trapasis	kie troas la kuraĝo
Aj, Karmela! Aj, Karmela! (×2)	Aj, Karmela! Aj, Karmela! (×2)

kaj la trupojn invadintajn	Kontraŭatakoj rabias,
rumba la rumba la rumba la (×2)	rumba la rumba la rumba la (×2)
ili bone bastonadis	kontraŭ ili ni rezistu
Aj, Karmela! Aj, Karmela! (×2)	Aj, Karmela! Aj, Karmela! (×2)

Perfidul-aerarmeo	sed samkiel ni batalas
rumba la rumba la rumba la (×2)	rumba la rumba la rumba la (×2)
elverŝadas furiozon	ni promesas rezistadi
Aj, Karmela! Aj, Karmela! (×2)	Aj, Karmela! Aj, Karmela! (×2)

Gvantamino - Guantanamera

Teksto: Jose Martí kaj Joseíto Fernández (1928) - Traduko: Liven Dek

Mi estas homo sincera	Mi kundividos la sorton
el lando riĉa je palmoj.	kun la mizera homaro,
Mi estas homo sincera	Mi kundividos la sorton
el lando riĉa je palmoj.	kun la mizera homaro,
Ĉar estas mi efemera,	ĉar ajna roĝo de monto
el mia kor' fontas kantoj.	ĝojigas min pli ol maro.

Jen miaj versoj helverdas,
 jen ili arde brulruĝas,
 Jen miaj versoj helverdas,
 jen ili arde brulruĝas,

kaj, kiel cervo vundita,
 arbare ili rifuĝas.

Refreno:

Gvantamino, kampara gvan-
 tamino,
 Gvantamino, kampara gvan-
 tamino

Unuiĝinta popolo neniam estos venkata*Teksto: Sergio Ortega; Muziko: Quilapayun;**Traduko: Ĝanfranko Molle — Rezisti en Ĉilio en 1973*

El pŭeblo unido — Ĥamas' sera'
vensido

Ekstaru, kantu vi pri la triumf'
Elmarŝas jam la flag' de unuec'
Kaj venos vi kaj marŝos apud mi
Kaj niaj kantoj kaj la flagoj estos
nova flor'
La lum' de ruĝa helaŭror'
Heroldas pri alven' de nova viv'

Popolo, marŝu antaŭen al triumf'
Sen dubo venos pli bono en es-
tont'
Por la akir' de vera la feliĉ'
Kaj en brueg' mil voĉoj batalpre-
taj levas sin
Per kanto pri la liberec'
Kaj venkas jam patrujo pro de-
cid'

Popolo, ĝi nune sin levas batale
Per voĉo giganta “antaŭen!” kri-
anta

El pŭeblo unido — Ĥamas' sera'
vensido

Patrujo strebas al popol-kunec'
De nord' al sud' mobiliziĝas ĝi
Ekde minejoj sunaj de la sal'
Ĝis arбай aroj en la sudo, kune al
Batalo kaj labor' por l' evolu'
Proksimas nun por ĝi estonta
glor'

Ekstaru, kantu vi pri la triumf'
Miloble homoj petas pri la ver'
De ŝtalo jen hardita batalrot'
Kun ili nin alvenas la justeco kaj
la bon'
Virin' kun fajro kaj insist'
Apudas ŝi ĉe brava laborist'

Popolo, ĝi nune sin levas batale
Per voĉo giganta “antaŭen!” kri-
anta

El pŭeblo unido — Ĥamas' sera'
vensido

La tempo de l' ĉerizoj - Le temps des cerises

Teksto: Jean-Baptiste Clément; Muziko: A. Renard; Traduko: Marcelo Redulez; Simbolo de la Pariza Komuno en 1871

Kiam kantos ni pri l' temp' de l'
ĉeriz'

Kaj la najtingal', kaj mokanta
merl'

Festados sen fino

Ebrios pro ĝoj' ĉiu belulino

En amanta kor' ekbrilos sunperl'

Kiam kantos ni pri l' temp' de l'
ĉerizoj

Fajfados kun glor' la mokanta
merl'

Sed mallongas tro la temp' de l'
ĉeriz'

Jes, kiam dum revo plukas duop'

Rubenojn por oreloj

Ĉerizoj de l' am' kun samvestaj
ŝeloj

Falantaj de l' arb', jen sanga
sirop'

Sed mallongas tro la temp' de l'
ĉeriz'

Jes, kiam koralon plukas duop'

Kiam vivos vi en temp' de l'
ĉeriz'

Se ektimas vi pro la amĉagren'

Evitu knabinojn

Ĉar ne timas mi kruelajn desti-
nojn

Ne vivos mi sen iama korprem'

Kiam vivos vi en temp' de l'
ĉeriz'

Ja suferos vi pro la amĉagren'

Ĉiam amos mi la tempon ĉerizan
Ĉar de tiu temp' mi gardas en
kor'

Vundegon sangantan

Kaj tiun doloron kun plor' vivan-
tan

Ĉe fortun' ne povos ĝin preni for
Ĉiam amos mi l' tempon de l'
ĉerizoj

Ĉar ĝin por memor' mi gardos en
kor'

Kuras vi, Amanda*Teksto kaj Muziko: Victor Jara - Traduko: Miguel Fernández*

Kuras vi, Amanda,
sub la pluvo strata
al fabriko granda,
kie laboradas Manuel.

Kun rideto larĝa,
pluvo sur la haroj,
sed nenio gravas,
krom kun li restadi en ver',
en ver', en ver', en ver', en ver'.
Por nur kvin minutoj.
La vivo eternas
dum nur kvin minutoj.

Avertas sireno
pri reven' al tasko,
kaj vi en paŝado
ĉion ja prilumas,
tiuj kvin minutoj
vin florigis plej.

Kuras vi, Amanda,
sub la pluvo strata
al fabriko granda,
kie laboradas Manuel.

Kun rideto larĝa,
pluvo sur la haroj,
sed nenio gravas,
krom kun li restadi en ver',
en ver', en ver', en ver', en ver'.
Iris li gerilen,
ne faris damaĝojn
sed iris gerilen
kaj en kvin minutoj
mortis pro dispafoj.

Avertas sireno
pri reven' al tasko.
Multaj ne revenis
samkiel Manuel.

Kuras vi, Amanda,
sub la pluvo strata
al fabriko granda,
kie laboradis Manuel.

Grândola, urbeto bruna - Grândola, vila morena*Teksto kaj muziko: Zeca Afonso; Traduko: Jorge Camacho*

Grândola, urbeto bruna
Tero de fratecmesaĝo
Regas popolvol' komuna
En vi, inda je omaĝo

En vi, inda je omaĝo
Regas popolvol' komuna
Tero de fratecmesaĝo
Grândola, urbeto bruna

Jen amik' ĉiuangule
 Egaleco sur vizaĝoj
 Grândola, urbeto bruna
 Tero de fratecmesaĝo

Tero de fratecmesaĝo
 Grândola, urbeto bruna
 Egaleco sur vizaĝoj
 Regas popolv' komuna

Sub la ombro de anzino
 Forgesinta sian aĝon
 Prenis mi por kompanino
 Grândola vian kuraĝon

Grândola vian kuraĝon
 Prenis mi por kompanino
 Sub la ombro de anzino*
 Forgesinta sian aĝon

La Internacio

Teksto: Eŭgeno Pottier; Traduko: J. Zilberfarb; Muziko: P. Ch. Degeyter

Leviĝu, en mizer' dronanta
 Sklavar' malsata de la ter'!
 Raci' nin vokas indignanta
 Al mortbatalo pro l' liber'.

Malnovan mondon ni detruos
 Ĝis fundament' de l' tirani'
 Kaj nian novan ni konstruos:
 Ne nuloj — ĉio estu ni!

Refreno ×2:

Por finlukto socia
 Ni grupiĝu en rond,
 Kaj la Internacio
 Triumfu en tutmond!

Ne la cezar', nek dia volo
 La savon portos de l' tiran, —

Liberon donos al popolo
 Nur ĝia propra forta man'.

Por ke pereu la rabuloj,
 Por liberiĝu la spirit',
 Varmegan feron la forĝuloj,
 Ni forĝu mem sen intermit'.

Refreno

Premegas ŝtato laboriston,
 Imposto kaj konstituci';
 Favoras nur ekspluatiston,
 Favoras nur al tirani'.

Sufiĉe da suferricevo.
 Laŭ egaleca la leĝar'.
 Neniu estas rajt' sen devo,
 Nek iu devo sen rajtar' ...

Indekso

• Organiza Kongres-Komitato	1
• Bonvenigaj vortoj	2
• Leono: urbo, provinco kaj reĝlando	3
• Fondaĵo Sierra Pambley	4
• Kongresejoj	5
• Prelegoj	6
• Libroj kaj filmoj	11
• Kulturaj vesperoj	13
• Ekskursoj	14
• Oficiala programo - SAT Kongreso	16
• Rekomendoj de la OKK	18
• Listo de partoprenantoj	19
• Rezistokantoj (paco kaj milito)	23